

Nun Ni Devus Efektivigi Neglektitan Revolucian Proponon

Ronald J. Glossop

Southern Illinois University (Sud-Ilinojsa Universitato) en Edwardsville (SIUE)

Edwardsville, Illinois 62025, Usono

rglossop@mindspring.com

Unu el la unauaj proponoj elparolitaj en la Asembleo de la Ligo de Nacioj en Decembro 1920 estis la propono de Lordo Robert Cecil, delegito de Sud-Afriko, ke por trakti "la lingvaj malfacilojn kiuj malpermesas rektajn rilatojn inter la popoloj" oni esperas ke "la instruado de la internacia lingvo Esperanto" "iĝos generala en la tuta mondo, por ke infanoj de ĉiuj landoj en la estonteco sciŭ almenaŭ du lingvojn, sian gepatran lingvon kaj facilan rimedon de internacia komunikado." [Peter G. Forster, The Esperanto Movement, The Hague: Mouton, 1982, paĝo 172]

La mondo nun estas tre malsama ol tia kia ĝi estis en 1920. Unu al la ĉefaj ŝanĝoj estis de la internaciismo kies figuro de la mondo estas globuso kun multaj landoj de diversaj koloroj al tutmondismo inspirita de fotoj de Tero de la kosmo kaj kaŭzita de pli rapidaj manieroj de transportado kaj komunikado. Ni homoj transiris de inter-naciisma mondo al planeda komunumo.

Grava kaj tro neglektita demando estas kion ni devus fari rilate al la lingva edukado de niaj infanoj. Ĉu ĉiu el ili devus lerni ne nur du lingvojn sed multajn lingvojn? Ĉu plano devus ekzisti por ke ĉiuj el ili lernu almenaŭ unu komunan lingvon; kaj se jes, kiun lingvon oni devus elekti? Ĉu oni devus elekti iun nacian lingvon kiel la angla, aŭ ĉu oni devus elekti nacieca-neŭtralan desegnititan, pli facile lerneblan lingvon kiel Esperanto?

Mi asertas ke estas dezirinde ke niaj infanoj lernu plurajn lingvojn sed tamen devus ekzisti plano por ke ĉiuj el ili lernu unu komunan lingvon por ke ĉiu Terano povu komuniki rekte kun ĉiu alia Terano. Kiel denaska parolanto de la angla, mi opinias ke la angla lingvo ne estas bona elekto por la komuna lingvo de planedo Tero. La elekto de iu ajn nacia lingvo estas malĵusta afero por ĉiuj el tiuj infanoj kiu havas malsaman denaskan lingvon, kaj en la kazo de la angla lingvo tio estas 95 procentoj el ili.

Malgraŭ miaj bonegaj spertoj kiel Esperantisto, mi konscias ke Esperanto estas fundamente eŭropa lingvo kaj sekve eble postulus kelkajn malgrandajn modifaĵojn por pli bone servi kiel la komuna monda lingvo. Esperanto tamen havas multajn konservindajn trajtojn kiel ke ĝi estas tute fonetika kaj ĉiam sekvas la gramatikajn regulojn kaj ankaŭ havas inĝenian sistemon de afiksoj kiuj multe faciligas la rapidan akiron de granda vortprovizo. Esperanto ankaŭ estas inspirita de la idealo de la unuobla homara familio.

Mi proponas ke la Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj (UNESKO) nomu komisionon por evoluigi nacieca-neŭtralan, facile lerneblan komunan mondan lingvon por ke ni povu efektivigi la mirindan idealon konsideritan de la Ligo de Nacioj antaŭ preskaŭ cent jaroj. Ĉu io ajn povas esti pli grava afero por la estonto de edukado?

1. La maltrafita oportuno

Unu el la unuaj sugestoj proponitaj en la Asembleo de la Ligo de Nacioj en Decembro 1920 estis tio de Lordo Robert Cecil ke por trakti "la lingvaj malfacilaĵoj kiuj malpermesas rektajn rilatojn inter la popoloj" oni esperas ke "la instruado de la internacia lingvo Esperanto" "iĝos ĝenerala en la tuta mondo, por ke infanoj el ĉiuj landoj ekde nun scipovu almenaŭ du lingvojn, sian gepatran lingvon kaj facilan rimedon de internacia komunikado." [1]

Bedaŭrinde tiu revolucia ideo ne estis efektivigata. En la Asembleo de la Ligo de Nacioj iu ajn propono povis esti akceptita nur se ĉiuj membro-ŝtatoj aprobis ĝin. Unu ŝtato kontraŭis la proponon de Lordo Cecil. Kiu ŝtato? Francio. Kial? Ĉar la propono indikis ke Esperanto estus la monda lingvo instruenda, kaj la Francoj pretendis ke la franca lingvo jam estas la monda lingvo.[2]

2. Preter inter-naciismo al tutmondismo

La Francoj argumentis ke Esperanto ne havas nacian kulturon. Sed tiu argumento supozas la inter-naciisma vidpunkto de la 20-a jarcento anstataŭ la tutmondismo de la 21-a jarcento. Inter-naciismo konceptas la mondon kiel kolekto de apartaj landoj kies anoj estas baze enfermitaj interne de siaj propraj landoj kaj kiuj interagas unu kun la alia nur per internaciaj organizaĵoj. La figuro por inter-naciismo estas monda mapo kun la diversaj ŝtatoj montritaj en diversaj koloroj. La tutmonda komunumo de la 21-a jarcento estas malsama. Ĝia koncepto estas bazita sur la fotoj de la Tero el la kosmo. Ĉiuj homoj estas membroj de unu planeda komunumo. Sekve ni devus povi komuniki rekte unu kun la alia.

Kiam oni traktas edukadon, oni devas konsideri la mondo de la estonteco. Grava demando estas, Kion vi devus fari rilate al lingva edukado por infanoj. Ni bezonas planon laŭ kiu ĉiuj el ili lernos almenaŭ unu komunan lingvon, por ke ĉiuj el ili en ĉi tiu planeda komunumo povu komuniki kun ĉiuj aliuloj, ne nur kun tiuj kiuj hazarde loĝas en tiurilataj landoj.

3. La lingva-edukada demando antaŭ ni

Kion ni devus fari rilate al la lingva edukado por niaj infanoj? Ĉu ĉiu el ili devus lerni ne nur du lingvojn sed multajn lingvojn? Ĉu ili devus lerni almenaŭ unu komunan lingvon? Se jes, kiun lingvon oni devus elekti? Ĉu ni penus uzi kiel la tutmonda lingvo iun nacian lingvon kiel la anglan aŭ la ĉinan? Aŭ ĉu ni devus elekti kiel la tutmonda lingvo kiun ĉiuj infanoj devos lerni iun nacieca-neŭtralan, desegnititan, pli facile lerneblan lingvon kiel Esperanton?

Eĉ kvankam la angla estas mia denaska lingvo, mi volas argumenti kontraŭ la vidpunkto ke la angla devus esti la komuna tutmonda lingvo instruenda al infanoj. Mi opinias ke la racia kaj morale ĝusta elekto por la unua fremda lingvo por ĉiuj infanoj estas Esperanto.

Mi ne asertas ke nia celo devus esti ke infanoj lernu nur du lingvojn, sian unuan lingvon kaj la komunan tutmondan lingvon. La celo devus esti ke homoj lernu multajn lingvojn, sed ĉiuj infanoj devus lerni almenaŭ la komunan tutmondan lingvon, por ke ili povu komuniki rekte kun ĉiuj aliaj Teranoj.

4. La morala dimensio de la tutmonda-lingva demando

Mi urĝas ĉiujn konsideri serioze la moralan dimension de ĉi tiu demando pri kiun unuan fremdan lingvon oni devus instrui al ĉiuj infanoj. Mi opinias ke estas fundamente malmorala afero elekti iun ajn ekzistantan nacian lingvon servi kiel la tutmonda lingvo.

Se iu ajn ekzistanta nacia lingvo iĝus la komuna tutmonda lingvo, landoj kiuj uzas tiun lingvon akiros statuson super la aliaj. Ĉi tiu luktado por plej alta statuso estas la speco de konkurso kiu produktis du mondmilitojn kaj la Malvarman Militon. Tia inter-naciisman konkurson ni devas ekfini.

Uzi iun ajn nacian lingvon kiel la komunan tutmondan lingvon estas ankaŭ maljusta al ĉiuj infanoj kies unua lingvo estas alia lingvo. Kiel homo kies unua lingvo estas la angla, mi konstante estas memorigita pri la maljusteco de la aktuala situacio. Aliuloj devas lerni novan lingvon, sed mi povas uzi mian denaskan lingvon. Kiel maljuste! Plue, mi estas inter la malpli ol 5 procentoj el la homoj en la tuta mondo kiuj uzas la anglan kiel sia denaska lingvo.[3] Tial pli ol 95 procentoj de ĉiuj homoj devas lerni duan lingvon por povi partopreni ĉi tiajn internaciajn konferencojn kiuj uzas nur la anglan lingvon. Eĉ se la tutmonda lingvo estus la mandarena ĉina lingvo, necesus ke 88 procentoj de la homo en la tuta mondo lernu ĝin kiel dua lingvo.[4]

Se iu ajn nacia lingvo estus uzata kiel la komuna tutmonda lingvo, landoj kiuj uzas tiun lingvon havus maljustan ekonomian avantaĝon super aliaj landoj. Krom la avantaĝo ke ili ne devos instrui duan lingvon al siaj infanoj, ili havus la ekonomian avantaĝon ke aliuloj devos veni al siaj landoj por lerni sian lingvon. Ili ankaŭ gajnus la ekonomian avantaĝon ke ili ne devos meti duan lingvon sur la produktojn kiujn ili vendas.

5. La kazo kontraŭ la uzo de la angla kiel la tutmonda lingvo

Ĉar necesus ke ĉiuj infanoj lernu la tutmondan lingvon, ĉi tiu lingvo devus esti relative facile lernebla. Ĉar nia celo estas por infanoj lerni multajn lingvojn, ili devus havi bonan unuan sperton kiu instigos ilin voli studi aliajn lingvojn. La plej bona ebleco estus tute fonetika lingvo en kiu ili lernus kune la skribitan kaj parolatan lingvon.

La angla ne estas tia lingvo. La skribita angla kaj la parolata angla estas tiel malsamaj ke ili devas esti lernataj aparte. Ne estas logika situacio ke la vortoj “so” (S-O) kaj “do” (D-O) kiuj aspektas tiel similaj devus esti prononcataj tiel malsimile. Ne estas logika situacio ke la vortoj literumitaj S-E-W kaj S-O-W devus esti prononcataj same kiel S-O. En la angla lingvo vortoj kiujn oni literumas simile estas prononcataj malsimile kiel la vortoj literumataj T-H-O-U-G-H kaj T-H-O-U-G-H-T kaj T-H-R-O-U-G-H. La angla lingvo enhavas multajn strangaĵojn kiel la aldono de la litero S al verboj en la tria persono singulara. Malregulaĵoj ekzistas rilate al la malsamaj tensoj de la sama verbo, kiel “go,” “went,” kaj “have gone.” Rimarku la malregularan konjunkcion de la verbo “to be.” “I am,” “you are,” “he is” kaj malsimile en la preterito “I was,” “you were,” kaj “he was,” sen menciigi la fakton ke en ĉi tiuj vortoj la litero S estas prononcata kiel la litero Z. Ĉi tiuj mallogikaj trajtoj de la angla lingvo eble kaŭzus multajn infanojn simple rezigni pri la lernado de iu ajn fremda lingvo.

6. La kazo por la uzo de Esperanto aŭ versio de ĝi kiel la tutmonda lingvo

Anstataŭ la angla, ni devus uzi Esperanton. Tiuj kiuj neniam lernis Esperanton ne komprenas la valoron de ĝia inĝenia karaktero kaj kiel facile oni povas lerni ĝin. Tiuj kiuj neniam instruis Esperanton ne konstatas kiel rapide infanoj povas lerni ĝin.[5] La alfabeto de Esperanto havas 28 literojn. Ĉiu litero havas unu kaj nur unu sonon. Ĉiu el la kvin vokaloj ĉiam indikas apartan silabon, kaj en ĉiu mult-silaba vorto la akcento ĉiam estas sur la antaŭlasta silabo. Oni povas facile determini kiel ĉiu vorto devus esti prononcata kaj literumita.

Se ĉiuj infanoj en la mondo lernus desegnitajn lingvojn kiel Esperanto, aliaj avantaĝoj sekvus. Unu estus la konservado de la minoritataj lingvoj kiuj nun pereas kiam ili alfrontas lingvojn subtenatajn de potencaj landaj registaroj. Se la tutmonda lingvo estus Esperanto, homoj en tiuj minoritataj komunumoj povus daŭre uzi siajn lingvojn interne de siaj propraj komunumoj kaj Esperanto por tutmonda komunikado.

Dua avantaĝo rilate al la postulo ke infanoj lernu Esperanton kiel sia unua fremda lingvo estas ke ili evoluigus pozitivan sintenon al la lernado de novaj lingvoj. Eksperimentoj montris ke lernantoj kiuj lernis Esperanton pli rapide lernas aliajn eŭropajn lingvojn.[6]

Tria avantaĝo rilate al la postulo ke infanoj lernu Esperanton estas ke ili evoluigus identecon kiel membroj de la monda komunumo simile kiel la lernado de nacia lingvo kondukas al identeco kun tiu nacia komunumo.[7] Se ĉiuj infanoj de la mondo lernus la saman tutmondan lingvon, ili pensus pri si mem kiel membroj de la tutmonda komunumo kaj estus malpli inklinitaj batali en militoj kontraŭ aliaj membroj de tiu komunumo.

Kvara avantaĝo rilate al la postulo ke infanoj lernu Esperanton estas ke ili povus uzi modernan teknologion por rekte komuniki kun aliaj infanoj ĉie.[8] Personaj amikecoj povus evolui sen malhelpo de landlimoj kaj malsamaj naciaj lingvoj.

Esperanto estis desegnata por servi kiel la rapide lernebla lingvo por internacia komunikado dum la internaciista 20-a jarcento. Ni devus nun ekuzi ĝin kiel la tutmondan lingvon en la 21-a jarcento.

7. Eblaj ŝanĝoj por fari Esperanton pli kulture neŭtrala

Oni povas konsideri Esperanton esti eŭropa lingvo, kaj sekve oni povus argumenti ke ĝi devus esti modifita por servi kiel kulture neŭtrala tutmonda lingvo. Ĉu oni povus fari Esperanton pli kulture neŭtrala se oni povus enkorpiigi terminojn de aziaj kaj afrikaj lingvoj? Tamen Esperanto nun en sia aktuala formo estas entuziasme subtenita de homoj tra la tuta mondo. La registaro de Ĉinio faris tiom kiom iu ajn landa registaro por subteni la uzon de Esperanto.[9]

Por trakti ĉi tiun demandon, mi proponas ke la Eduka Scienca kaj Kultura Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj (UNESKO), kiu en 1954 kaj 1985 adoptis rezoluciojn kiuj esprimis subtenon por Esperanto, nomu komisionon por evoluigi iomete modifitan, pli kulture neŭtralan version de Esperanto. Oni devus doni al ĉi tiu komisiono limdaton de kvin jaroj. Pluraj spertaj Esperantistoj devus esti membroj de ĉi tiu komisiono inkluzive de kelkaj el Azio kaj Afriko. Ĉi tiu komisiono ankaŭ devus havi membrojn kiuj bone konas la Haynuan pinĵinon kaj la Bahasan Indonezian lingvon. Se la komisiono ne sukcesus produkti la deziratan modifitan kulture neŭtralan version de Esperanto ĝis la kvinjara limdato, la aktuala versio de Esperanto estus oficiale rekomendita de UNESKO kiel la komuna tutmonda lingvo instruenda al ĉiuj infanoj ĉie.

8. Finaj Pensoj

Esperanto estas unu el la plej grandaj inventoj dum la homara historio. Estas granda tragedio ke ĝi ne estis adoptita kiel la monda lingvo en la inter-naciisma 20-a jarcento, kaj dum la tutmondiĝa 21-a jarcento ĝi ankoraŭ ne ricevas la subtenon kiun ĝi meritas. Ĉu io ajn povas esti pli grava afero por la estonteco de edukado ol tutmonda sindevontigo instrui al ĉiuj infanoj ĉie facile lerneblan komunan tutmondan lingvon?

[1] Peter G. Forster, *The Esperanto Movement*, paĝo 172.

[2] La *The Esperanto Movement* de Forster informas nin kiel la propono de Lord Robert Cecil iniciatis la diskuton, kaj ĝi ankaŭ liveras detalan rakonton pri tio kio poste okazis rilate al Esperanto en la Ligo de Nacioj kaj aliaj internaciaj organizoj. Vidu ĉapitron sesan, paĝojn 169-187.

[3] *The World Almanac and Book of Facts-2013*. Ĉe paĝo 717 la indikita nombro da homoj kiuj uzas la anglan kiel sia unua lingvo estas 328 milionoj. Ĉe paĝo 733 la indikita nombro da homo en la mondo estas 7,017,543,964. Tial la proporcio de homoj kiu uzas la anglan kiel sia unua lingvo estas 4.67436 elcentoj.

[4] *The World Almanac and Book of Facts-2013*. Ĉe paĝo 717 la indikita nombro da homoj kiuj uzas la mandarenan ĉinan lingvon kiel sia unua lingvo estas 845 milionoj. Ĉe paĝo 733 la indikita nombro da homo en la mondo estas 7,017,543,964. Tial la proporcio de homoj kiuj uzas la mandarenan ĉinan lingvon kiel sia unua lingvo estas 12.04218 elcentoj.

[5] Alvino E. Fantini kaj Timothy G. Reagan, *Esperanto and Education: Towards a Research Agenda*. Vidu aparte paĝojn 27-33.

[6] Helmar Frank, "Valeur propédeutique de la langue Internationale" ["Valoro propedeŭtika de la lingvo internacia"], *Journée d'étude sur l'Esperanto*. University of Paris-Vincennes, Nov. 1983, pp. 121-136 kaj J. H. Haloran, "A four-year experiment in Esperanto as an introduction to French," *British Journal of Educational Psychology*, Vol. 22, nr. 3, Nov. 1959, pp. 200-204..

[7] Kurt E. Müller, (ed.), *Language Status in the Post-Cold-War Era*. Vidu aparte paĝojn 117-139.

[8] Humphrey Tonkin kaj Grahame Leon-Smith, *The Future of Modern Languages in English-speaking Countries*, (Esperanto Documents, New Series, 18). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1979, paĝo 17.

[9] Ulrich Lins, "Esperanto as Language and Idea in China and Japan," *Language Problems and Language Planning*, 32:1 (2008), pp. 47-60 kaj "China Interreta Informa Centro: Historia de Esperanto," <<http://esperanto.china.org.cn/world/shi-window/index5.htm>>.

Referencoj:

- Blanke, Detlev. *Plansprache und Nationalsprache [Planned Language and National Language]*. Berlin: Humboldt University, 1976.
- “China Interreta Infornna Centro: Historia de Esperanto,” <<http://esperanto.china.org.cn/world/shi-window/index5.htm>>.
- Cwik, Michael, Hans Erasmus, Edward Symoens, Elisa Kehlet, Gregoire Maertens, kaj G. Martinetto. *Komunikado en la Eŭropa Komunumo*. Rotterdam: Esperanto-Asocio, 1992.
- Eichholz, Rüdiger and Vilma Sindona Eichholz. *Esperanto in the Modern World*. Bailieboro, Canada, (2nd ed.), 1982.
- Fantini, Alvino E. and Timothy G. Reagan. *Esperanto and Education: Towards a Research Agenda*. Washington: Esperantic Studies Foundation, 1992.
- Forster, Peter G. *The Esperanto Movement*. The Hague: Mouton Publishers, 1982.
- Frank, Helmar. “Valeur propédeutique de la langue internationale” [“La Valoro propedeŭtika de la lingvo internacia”], *Journée d'étude sur l'Esperanto*. Univ. of Paris-Vincennes, Nov. 1983, pp. 121-136.
- Glossop, Ronald J. “Kial Ĉinio estas fekunda kampo por la instruado de Esperanto,” *Internacia Pedagogia Revuo*, 2011/3, pp. 26-28.
- Haloran, J. H. “A four-year experiment in Esperanto as an introduction to French,” *British Journal of Educational Psychology*, Vol. 22, nr. 3, Nov. 1959, pp. 200-204.
- Kováts, Katalin (ed.), *La Komuna Eŭropa Referenckadro*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2007.
- Lins, Ulrich, “Esperanto as Language and Idea in China and Japan,” *Language Problems and Language Planning*, 32:1 (2008), pp. 47-60.
- Martinelli, Perla and Giorgio Silfer, *Universala Deklaracio Pri la Lingvaj Rajtoj*. La Chaux-de-Fonds, Switzerland: Kooperativo de Literatura Foiro, 2001.
- Müller, Kurt E. (ed.), *Language Status in the Post-Cold-War Era*. Lanham: University Press of America, 1996.
- Pei, Mario. *Wanted: a world language*. New York: Public Affairs Committee, 1969.
- Tonkin, Humphrey and Grahame Leon-Smith, *The Future of Modern Languages in English-speaking Countries*, (Esperanto Documents, New Series, 18). Rotterdam: Universal Esperanto Association, 1979.
- World Almanac and Book of Facts-2013, The*. New York: World Almanac Books, 2012.

Temo por ĉi tiu prezentaĵo: Innovative Teaching and Learning Methodologies.